



esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 1 / 2014





Parto 2 : Matematika vidpunkto


Akira Yoshizawa, kiu renovigis la arton de origamio, ankaŭ kreis sistemon por instrui al homoj kiel faldi modelojn. Oni nomas tiujn instrukciajn skemojn «diagramoj». Dank al tiu sistemo, origamio rapide kaj efike disvastiĝis pere de libroj.

Oni nomas tion faldŝablono (angle, «crease pattern»).

Jen, malantaŭ tiu ĉi Pando (kreita de Noboru Miyajima), la faldŝablono por faldi ĝin. En tiu ĉi kazo, la faldaj instrukcioj eĉ ne estas indikitaj. Pere de tiu nura skemo, kelkaj faldemuloj scipovas sukcesi faldi la tutan figuron. Sed la ekzerco estas vere malfacila, ĉar oni devas memtrovi laŭ kiuj referencaj linioj oni obtenas la faldojn.

噴火飛龍 Fiery Dragon


創作：陳柏熹 creator : Kade Chan 圖解：陳漢輝 diagram : Jacky Chan 2008-05



Fiery Dragon by Kade Chan - p. 1

Diagrama komenco de la drako de Kade Chan.

Nun, kio okazus se oni komplete malfermus la paperon de origamio kreaĵo ? Oni obtenus kvadraton kun faldo-linioj geometrie lokitaj.



Post studado de faldŝablonoj, iu origamiemulo kaj matematikisto, Robert J. Lang, trovis matematikan metodon por krei novajn figurojn. Per geometriaj cirklo-aranĝoj, li eltrovis la kutimajn teknikojn por faldi ĉiujn eblajn figurojn. Unue, li difinas kiom da pintoj necesas por faldi tiun beston. Ekzemple, se li volas krei migalon, li scias ke necesas 8 pintojn por fari la krurojn, du por la hokojn kaj eventuale unu por la korpon. Jen lia rezulto :



Robert J. Lang kaj lia araneo


Lang publikigis la libron «Origami design secret» kaj dank'al tiu libro, li iĝis fama en la origamia kaj ankaŭ matematika mondo.

Samy

Titolaj fotoj : Dancanta gruo de Robert J. Lang (Usono) kaj naĝo-floko pavimo de Christiane Bettens (Francio)

K O L O F O N O

39a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

JANUARO

Merkredo la 22a 18:30 - 20:00 **Prelego: Neven Kovačič pri «Jugoslavio kaj post ĝi»**

Sabato la 25a **KER-Ekzamenoj en Antverpeno** - parola kaj skriba

Dimanĉo la 26a 18:00 - 19:00 **Sankta meso en Esperanto** en la Resurekta Kapelo
 strato Van Maerlant, 22 - 24 - Etterbeek

FEBRUARO

Sabato la 1a 14:00 - 16:00 **Konversacia Rondo** - Lydia BUYST (tel : 054 33 01 51)
 1755 Dilbeek (Kulturcentro «Westrand»)

Merkredo la 19a 18:30 - 20:00 **Prelego: Bernard-Régis Larue :**
 « Ĉu la ĉielo falos sur nian kapon? »

MARTO

Sabato la 1a 11:00 - 18:00 **EBGa FESTO** 61, rue de la Victoire 1060 Bruselo

Merkredo la 5a 18:30 - 20:00 **Prelego: Bernard-Régis Larue pri Islando**

de vendredo la 21a 17:00 **PEKO 2014 : en Amougies (apud Ronse/Renaix)**
ĝis dimanĉo la 23a posttagmeze Informoj : doumontvalere@yahoo.fr +32 (0)485 517 552

APRILIO

de la 26a de Aprilo **PRINTEMPaS** en kastelo Grésillon
 Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou (Francio)
 Intesivaj kursoj kun Radojica Petrović el Serbio, Christophe
 Chazarein el Okcitanio kaj Ŝtonĉjo el Parizo.
Informoj : gresillon.org

Saluton Kara Legantaro !

El niaj lastaj retmesaĝoj, ni plukis por vi bondezirojn kiujn prezentis Jacques Brel en la radiostacio «Europe 1» la 1an de Januaro 1968.

«Mi deziras al vi senĉesajn revojn kaj fervoran emon realigi kelkajn.

Mi deziras al vi ŝati tion kio estas ŝatinda, kaj forgesi tion kio estas forgesinda.


Mi deziras al vi pasiojn.

Mi deziras al vi silentojn.

Mi deziras al vi birdajn kantojn dum vekiĝo kaj infanajn ridojn.

Mi deziras al vi rezisti al enkotigado, al indiferenteco, al nuntempaj negativaj virtoj.

Mi deziras al vi ĉefe esti vi mem.»



Niaflanke, per multe malpli da talento, ni elkore deziras al vi mirindan jaron 2014, ĝojon, energion, interesajn festajn renkontiĝojn kaj solidarecon !

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org




Enhavo

- Paĝo 2 : Origamio parto 2
- Paĝo 3 : Kolofono kaj agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj enhavo
- Paĝo 5 : Eŭropo : grava defcito de abeloj por polenigi la kulturojn
- Paĝo 6 : Ĉina Eo-muzeo + Seminario «Elloke Tutmondan»
- Paĝo 7 - 9 : La Retiriĝo
- Paĝo 10 - 12 : Global Voices
- Paĝo 13 : Esperanto estas eduka movado
- Paĝo 14 - 15 : 4a Printempe en Dahlem-Baasem
- Paĝo 16 : Voĉo de la Tempo
- Paĝo 17 : Vojaĝo per biciklo
- Paĝo 18 - 19 : Lidia Zamenhof kaj Bahaismo
- Paĝo 20 : EBGa FESTO !

Eŭropo : grava defcito de abeloj por polenigi la kulturojn

Eŭropo montras defciton je 13,4 milionoj da abelkolonioj t.e 7 miliardoj da tiuj bestoj, por ĝuste polenigi la kulturojn, opinias esploristoj de la Universitato de Reading (Unuiĝinta Reĝlando).



la konkludoj de la studaĵo publikigita merkredon en la revuo «Plos One» (plosone.org), pro disvolvado de kulturoj je oleodonaj plantoj uzitaj interalie en agrokulturaĵoj, la bezonoj de polenigo kreskis kvinoble pli

rapide ol la nombro de abelkolonioj inter 2005 kaj 2010.

ZORGODONA !

Pro tio, hodiaŭ, defcita situacio montriĝas : « Eŭropo posedas nur du trionojn el la bezonataj kolonioj, t.e defcito de 13,4 milionoj da kolonioj, ekvivalenta al 7 miliardoj da abeloj », indikas la aŭtoroj. En duono el la studataj landoj, « La nombro de abeloj ne sufiĉas por ĝuste polenigi la kulturojn, interalie en Francio, Germanio, Unuiĝintaj Reĝlando kaj Italio », precizigas la esploristoj.



La kazo de Britio estas aparte zorgodona kun malpli ol unu kvarono el la bezonataj abeloj por polenigado.

En Francio kaj Germanio, inter 25% kaj 50% el la bezonataj abelkolonioj ĉeestas.

AGADI !

Konsekvence, emfazas la sciencistoj, agrikulturo estas pli kaj pli dependa de la sovaĝaj polenigantoj (burdoj... ktp.), specioj kiuj povas montriĝi vundeblaj, aparte okaze de monokulturoj.

« Tiu studaĵo montras ke la eŭropa politiko koncerne agrokulturaĵojn havas kiel neantaŭviditaj konsekvencoj igi nin dependaj de sovaĝaj polenigantoj », notas Tom Breeze, unu el la aŭtoroj de la studaĵo.

Laŭ lia kolego Simon Potts, « Tiu situacio kondukas nin al katastrofo se ni ne agadas nun ». « Ekzistas kontraŭdiroj inter mediaj kaj agrikulturaj politikoj en Eŭropo : la kultivistoj estas kuraĝigitaj kultivi oleodonajn plantojn, sed pripensado ne sufiĉas pri la maniero helpi la insektojn certigi la polenigadon », opinias Simon Potts.

09/01/2014 - <http://neniammilitointerni.over-blog.com>

http://www.liberation.fr/terre/2014/01/08/l-europe-en-grave-deficit-d-abeilles-pour-polliniser-ses-cultures_971548?xtor=rss-450

Ĉina Esperanto-Muzeo malfermita en Zaozhuang

La internacia Esperanto-muzeo en la Universitato de Zaozhuang en orienta Ĉinio havis sian inaŭguron la 16-an de novembro 2013. Pli ol 300 esperantistoj kaj gastoj partoprenis en la malferma ceremonio.

Ĉina Esperanto-Muzeo kun 680 kvadrataj metroj kaj 26 000 kolektajxoj en la Universitato de Zaozhuang estas kunkonstruita de Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Universitato de Zaozhuang, kaj la muzeo havis sian inaŭguron la 16-an de novembro dum la 10-a Ĉina Kongreso de Esperanto en Universitato de Zaozhuang. Estraranoj de ĈEL kaj la universitato, esperantistoj el Ĉinio, Koreio, Japanio, Italio kaj aliaj landoj partoprenis en la inaŭguro. La konstruado de la muzeo estas granda evento de la Ĉina Esperanto-Movado. Dum la prova malfermo en 5 monatoj pli ol 7000 vizitantoj estis akceptitaj de la muzeo, kiu jam fariĝis bazo por diskonigi Esperanton al la publiko. La muzeo ricevis pli ol 80 gratulajn mesaĝojn el 30 landoj.



S-ro Lee Jungkee parolis en la inaŭguro

Sun Mingxiao

La adreso de la muzeo estas:
Zaozhuang Xueyuan Shijieyu Bowuguan. Shandong.
Ĉinio. CN-277100. Telefono: 86-632-378 6905 133 9637 6717
Retadreso: semio@163.com

libera folio
SENDEPENDA MOVADA BULTENO

Seminario «ELLOKE TUTMONDEN» en Tuluzo (Francio)

Eurokka organizas, kadre de la eŭropa programo Grundtvig, seminarion okazontan de la **21a de ĝis la 24a de februaro**.

Trejnseminario de "Elloke Tutmondan" (nomo de nia partnera Grundtvig-projekto)

Celo : interkultura kunlaborado, motivigo kaj trejnado de volontuloj

Ĉefa temo de la tuluza seminario **"Hom-mastrumado"**

Suba temo : **Organizado de spektaklo**

Partneroj: Skota Eo-asocio, Triesta Eo asocio, Bialistoka Eo-Asocio, Torina Eo-Asocio, Esperanto Asorti (Litovio), EUROKKA kaj lokaj esperantistoj el Esperanto-Kultur-centro kaj de la regiona federacio

Datoj : **21a - 24a de februaro 2014**

+1 aŭ 2 tagoj antaŭ aŭ / kaj poste por libera vizito de Tuluzo kaj ĉirkaŭaĵoj

Loko kie okazos la seminario : **CFPPA Toulouse** – 2 route de Narbonne, 31326 Auzerville-Tolosan

http://www.esperanto-midipyrenees.org/articles/dossier.php?val=327_seminario+elloke+tutmondan



La Retiriĝo (La Retirada)

Prelego preparita por la Okcitana-kataluna kongreso en Salardu (1a ĝis 3a 11 - 2013)
Floreal Martorell



Ekzilo de la Hispanrespublika popolo fine de januaro ĝis komence de februaro 1939

Tri ondoj de rifuĝintoj atingis Francion antaŭ la elmigrado de 1939: Kiam Eŭskio estis prenita de la naciistoj. En somero 1936, 15.000 homoj fuĝis al la franca limo. Kiam Bilbao falis inter junio kaj oktobro 1937, 120.000 rifuĝintoj fuĝis sian landon, inter ili multaj infanoj evakuitaj al Britio, Belgio kaj Sovetio. Kaj en printempo 1938, kiam alta Aragono estis prenita de la frankistoj, 25.000 homoj transiras la limon. Malgraŭ la iro kaj reveno de kelkaj el ili, fine de 1938, 40.000 hispanaj respublikanoj ankoraŭ estas rifuĝintoj en Francio, inkluzive de multaj infanoj. Sed ekde aprilo 1938 Édouard Daladier iĝas denove prezidanto de la Konsilio (Registaro) kaj adoptis ksenofobajn kaj limigaj disponojn por la akcepto de eksterlandanoj (2a de majo, 1938 Dekreto pri Polico por eksterlandanoj), Francio ne plu volas malindajn eksterlandanojn (klandestinojn sen permesiloj) sur sia teritorio.



Tiuj kiuj ne povas reiri eksterlanden estas malpermesitaj moviĝi en la lando. Kaj la 12an de novembro 1938, alia dekreto kondiĉas ke tiuj fremduloj kiuj ne povas esti forpelitaj en ajna alia lando estos forsenditaj al specialaj centroj kaj estos konstante kontrolataj kiel nedezirindaj kaj potenciale danĝeraj individuoj. Ĉi sento de malakcepto de nedezirataj fremduloj trairas ĉiujn politikajn tendencojn, tiom la dekstran kiom la maldekstran. Kaj estas en tiu rigoriga etoso kaj de malakcepto de eksterlandanoj kiam alvenos pli ol duonmiliono da hispanoj en februaro 1939.



Evakuado de Barcelono lastan semajnon de januaro 1939

For de la espero de bonveniga kaj frateca Francio, ili spertos plenan pezon de la kontroligaj disponoj, de malliberigo kaj forpelado al la landlimo.



Ekzilo al Francio

Sub la registaro de Vichy suferos pri ĉi tiuj disponoj ankaŭ la kontraŭ-faŝismaj germanaj judoj, aŭstraj, polaj kaj eĉ la francaj.

La dekreto de 18 novembro, 1939, akcentas la subpremon ĉar ĝi kondiĉas jene: " la danĝeraj Individuoj pro la nacia defendo aŭ publika sekureco povas, laŭ decido de la prefekto esti forigataj de la militaj aŭtoritatoj el la lokoj kie ili loĝas kaj, se necese, ili povas esti devigataj loĝi en centro indikita laŭ decido de la Ministro de Nacia Defendo kaj Milito kaj de la Ministro de la Internaj aferoj ". Dekreto plimalbonigita pro la aplikoj truditaj al la prefektoj fare de Albert Sarrault (ministro pri internaj aferoj) la 14an de decembro 1939: "La ekstremismo kiu, pro siaj konsiloj kaj flugfolioj, provas rompi en la fabrikoj la fortan spiritostaton de laboristoj, la alarmisto en la rondoj aŭ salonoj kiu ĵetas al sia aŭdantaro mensogajn vortojn aŭ panikajn profetaĵojn, same iĝos malamiko de la Patrujo, kaj la devo kiun indikas al vi la dekreto dela 18a de novembro estas detekti ilin, senprokraste, kaj forpeli ilin el la lokoj kie ili havas nocan agadojn kaj influon, tiom eĉ pli malutilaj ke ili sukcesas

eskapi la leĝon (...) Tial, estas necese ne nur esti armitaj kontraŭ la krima agado aŭ krimulo sed ankaŭ kontraŭ la volo tion fari (...) Tiel, la postulo de preventa zorgo iĝas tiom grava kiom la subpremaj disponoj (...) Ĉi tiu teksto estas serioza. Ĝi metas en viajn manojn [tiujn de la prefektoj] timindan armilon. Ĝi estas superdrasta dispono dum paca periodo. Sed ĝi estas ĝuste tiel ĉar estas leĝo por milita periodo, kaj ĝi malaperos kun ĝi, estas escepta leĝo. "

La 27an de januaro 1939, Francio parte malfermas la landlimon por lasi eniri malgrandan parton de Respublika hispana popolo, virinojn , infanojn kaj vunditojn, dum la lastaj batalantoj daŭrigas la lukton ĝis komenco de februaro, kiam alvenas la horo de la "Retirada" (la retiriĝo).



Longaj vicoj de civiluloj kaj soldatoj provas eskapi la faŝistajn persekutistojn, alvenante ĉe diversaj landlimaj pasejoj (Port-Bou/Cerbère , Le Perthus, Prats de Mollo, Puigcerdá / Bourg-Madame, sed ankaŭ el Eŭskio kaj tra la maro)

Ĉi tio estis neniam okazinta en la historio de ekzila migrado, unu el la plej grandaj en la modernaj tempoj: pli ol duon miliono da homoj, forlasante la ruinojn de sia Respubliko serĉis rifuĝon en Francion.



Vico de rifuĝantoj atendente eniron en Francion ĉe Cerbera fine de januaro 1939



Hispanaj respublikanoj transpasantaj la Pireneojn

Malgraŭ la oficialaj deklaroj kiuj asertas ke ĉio estas preta por akcepti ilin, ĉio mankas.

Nur efikas, ordo kaj sekureco por kio nenio estis ŝparita.

La akcepto neniel estas frateca.



Transpaso de Pireneoj

Longaj vicoj de venkitaj homoj etendiĝas laŭ la pireneaj vojoj. Bombite de la frankista aviado, ili forlasas la vojojn por iri tra la vintraj montoj. Multaj ne havas bonajn ŝuojn (nur ŝnurŝuojn) nek vintrajn vestaĵojn.



Civilaj rifuĝintoj atendantaj la malfermon de la franca landlimo en Le Perthus fine de januaro 1939

La rifuĝintoj, kvazaŭ parioj, estas traktitaj kiel malamikoj. La tuta landlima areo, iĝis milita zono sub kontrolo. Por multaj rifuĝintoj, azila tero iĝos ilia tombo.

Por aliaj komenciĝos koncentreja vivo, tiu de koncentrejoj, kun malamo kaj sufero kiu lasos neforviŝeblajn spurojn por eterne.

(daŭrigota)



Transpaso de la pireneoj

Monda blogaro nun ankaŭ en Esperanto

La prestiĝa internacia reto de volontulaj blogantoj kaj tradukantoj, Global Voices, nun havas sektion ankaŭ en Esperanto. La ĵus fondita Esperanto-sekcio ankoraŭ estas malforta, kaj ĝia estonteco ne estas certa, sed la lingva respondeculo de Global Voices jam miras pri la interesiĝo flanke de esperantistoj.

Global Voices estas internacia reto de blogantoj, tradukantoj kaj civitanaj ĵurnalistoj, kiuj raportas pri la evoluoj en la blogosfero diversloke en la mondo. Laŭ sia manifesto, *Global*

Voices celas "kune por alporti al vi la informadojn de civitanoj el la mondo, kun emfazo sur voĉoj kiuj ordinarne ne aŭdigas en internaciaj gravaj gazetaroj" (Citita laŭ la Esperanto traduko).

La anglalingva reto estis fondita en 2004, kaj en 2007 al ĝi estis aldonita la projekto *Lingua*, kiu celas disvastigi la enhavon de *Global Voices* en aliaj lingvoj, helpe de volontulaj tradukistoj.

La malajzia Esperanto-aktivulo Adam Eng en aprilo 2013 kontaktis *Global Voices* por informiĝi pri la ebleco starigi Esperantan version de la retejo. La respondeculo de la projekto *Lingua*, Paula Góes, responde klarigis, ke ŝi tre ĝojus pri tia evoluo, sed ke eĉ se estas facile starigi retejon, ĝia konstanta funkciigado postulas multe da aktiva laboro.

– Ĉar la Esperanto-komunumo konsistas el tiaj pasiaj homoj, mi certas ke tio ne estos problemo. Mi konsilas al vi paroli kun aliaj homoj kaj informiĝi pri iliaj interesiĝo kaj subteno. Se vi havos teamon kiu aliĝos, ni povos pluiri.

Pasis kelkaj monatoj, kaj fine malgranda teamo estis kolektita. Krom Adam Eng ĝin eniris la nikaragva aktivulo Uriel Gúrdian kaj Hirotaka Masaaki el Japanio. Laŭ Adam Eng estas kelkaj pliaj aliĝintoj, kiuj tamen ankoraŭ ne aktiviĝis kaj ne videblas en la retejo.



La ĝenerala lingva nivelo de la kontribuajtoj en la retejo (eo.globalvoicesonline.org/) ankoraŭ estas sufiĉe varia, kaj la enhavo ne ŝajnas plene sekvi la gvidliniojn de *Global Voices*, laŭ kiuj la alilingvaj retejoj principe nur traduku tekstojn el la grandlingvaj versioj de *Global Voices*. Sed Adam Eng esperas, ke la gvidlinioj povas ŝanĝiĝi:

– Laŭ tio kion diris Paula, fine de la jaro la teamo de *Global Voices* havas diskuton pri la projekto *Lingua*. Ĝi eble ne plu uzos nur artikolojn el la angla, sed la kontribuantoj el ĉiuj lingvoj povos skribi novan artikolon aŭ komenton en siaj lingvoj, kaj la angla fako tradukos tion al la angla. Vi povas vidi mian artikolon pri indiĝenaj popoloj (eo.globalvoicesonline.org/2013/10/164), kiu ne aperis en la angla paĝo.

Ankoraŭ mankas lingva revizianto por la esperantlingvaj tekstoj, sed laŭ Adam Eng la kontribuantoj helpas unu la alian por plibonigi la lingvan nivelon.

Libera Folio kontaktis Paula Góes por ricevi pliajn informojn pri la projekto. Ŝi estas impresita de la interesiĝo, kiun allogis la estiĝo de la Esperanta sekcio.

– La retejo en Esperanto aĝas eĉ ne du semajnojn! Mi estas sufiĉe surprizita pro tio, ke ni ricevas tiom da atento. Nia sperto kun aliaj retejoj estas, ke kutime daŭras kelkajn monatojn antaŭ ol iu entute rimarkas ilin. Ni eĉ ne anoncis la Esperanto-version interne, ĉar ni volas ke la retejo estu pli stabila, antaŭ ol publikigi ĝin. Mi estas vere surprizita!

Paula Góes rakontas, ke ŝi mem delonge esperis, ke *Global Voices* povos havi sekcion ankaŭ en Esperanto, sed ke la iniciato devis veni de la Esperanto-komunumo.

– Ni kreas novan lingvoversion nur, kiam parolantoj de la lingvo turnas sin al ni, petante tion. En mia unua retletero mi ĉiam demandas la petanton, ĉu ŝi aŭ li mem volus iĝi redaktoro kaj kunmeti teamon. Pri Esperanto, mi ricevis proksimume kvin retleterojn ene de semajno, mi respondis al ĉiuj, nenio revenis, ĝis fine Uriel skribis kaj akceptis iĝi la redaktoro.

Libera Folio: Ĉu povos aperi originalaj tekstoj en la esperantlingva retejo?

– Kiam temas pri originala enhavo, ni permesas mallongajn afiŝojn kun novaĵoj ligitaj al la lingvo de la retejo, ĉi-kaze Esperanto.

Libera Folio: Ĉu estas planoj por traduko en la alia direkto: el Esperanto ekzemple al la angla?

– Por ke tio okazu, ni unue devus produkti bonan enhavon en Esperanto, kiu estu signifa por internacia publiko, kaj havi volontulajn tradukantojn el Esperanto al la angla. Plej unue ni bezonas fortajn redaktorojn por la retejo. Ĝi aĝas nur du semajnojn.

libera folio
SENDEPENDA MOVADA BULTENO

05/2013



Global Voices bezonas provlegantojn

Esperanta versio de la monda blogaro Global Voices. Tamen jam post kelkaj semajnoj ĉesis aktivi la nikaragva redaktoro Uriel Gúrdian. Por ke la afero ne estingiĝu, Hirotaka Masaaki (Vastalto) konsentis iĝi redaktoro. Li esperas trovi kelkajn pliajn kunlaborantojn por la projekto, kiun li opinias same grava kiel Vikipedio aŭ Google-traduko.



Vastalto

Libera Folio: Kial vi akceptis iĝi redaktoro de la Esperanta versio?

Vastalto: — En la momento, kiam mi fariĝis kun-redaktoro meze de novembro,

mankis efektiva redaktoro al nia teamo. Mi ne volis, ke la Esperanta versio ŝrumpu kaj mortu. Inter la tiamaj malmultaj membroj mi ne trovis alian elekteblon. Cetere mi nomas min "kun-redaktoro". Tio signifas, ke nia teamo bezonas vere taŭgan redaktoron. Kial vi opinias grava, ke ekzistu Esperanta versio de *Global Voices*?



VIKIPEDIO
La libera enciklopedio

— Ĝi same valoras, kiel Esperanta versio de Vikipedio kaj Gugla Tradukilo. *Global Voices* estas tutmonda reta komunumo vaste konata kaj alirata. Havi tie Esperantan version estas grave pro du aferoj. Unu estas montri al la tutmonda, ke Esperanto ekzistas kaj. La alia estas kuraĝigi esperantistojn por ke ili kontribuu al intercivitana komunikado, kiu estas unu el la gravaj roloj de Esperanto.

Kiom da kunlaborantoj oni laŭ vi bezonas, por ke la retejo bone funkcii kaj estu interesa por la legantoj?

— Ni estas teamo de volontuloj. Mi ne volas de ili multon postuli. Mi esperas, ke ili kontribuu unu fojon semajne aŭ monate, kaj ke ĉiutage aperu almenaŭ unu nova artikolo en nia retejo. Por efektiviĝi tion, laŭ mia malpreciza kalkulo, ni bezonos 15 aktivajn tradukantojn, 7 kapablajn provlegantojn kaj taŭgan ĉefredaktoron. Nunmomente plej bezonataj estas provlegantoj.

Kiaj temoj laŭ vi povas esti aparte interesaj por la legantoj de la esperantlingva versio?

— Tio estas tro malfacila demando por ke mi respondu. Nun la kontribuantoj de nia teamo elektas temon laŭ sia bontrovo. Por liveri temojn interesajn al la legantoj ni ja bezonas kapablan redaktoron.

Ĉu vi antaŭvidas la eblon, ke tekstoj estos rekte verkataj por la esperantlingva versio, kaj poste tradukitaj al aliaj lingvoj? Kion precize signifas la gvidlinio, ke "resumaj" artikoloj verkataj originale en Esperanto devas "ligiĝi al esperantlingvaj retejoj"?



— Jes, ni havas la eblon, sed samtempe havas ankaŭ solvendajn problemojn. Laŭ mia ĝisnuna observo la gvidlinio pri verkado estas aplikata ne nur al la Esperanta versio sed ankaŭ al alilingvaj versioj krom la angla. Do artikoloj verkataj originale en iu lingvo devas "ligiĝi al tiulingvaj retejoj". Ĉar mi estas novulo en *Global Voices*, nunmomente mi ne kapablas doni pli

detalan klarigon.

Ĉu estas multe da laboro esti kunlaboranto de la esperantlingva versio de *Global Voices*?

— Ni atendas, ke niaj kontribuantoj povu uzi retan redaktilon (fakte tiun de Wordpress) per sia retumilo. Ĉiu povas labori laŭ siaj kapablo kaj libertempo.

Mark Fettes: "Esperanto estas eduka movado"

Kiel nova prezidanto de UEA, mi volus diri al vi, ke nia lingvo ja estas pli ol 125 jaraĝa nun, nia universala asocio pli ol 100 jaraĝa.

Sed fakte niaj ideoj ne malnoviĝis kun la tempo, nia laboro por paco, por amikeco, por justeco, por pli bona kompreniĝo inter la homoj de diversaj landoj ne kiel diris Zamenhof kiel francoj kun poloj sed kiel homoj kun homoj.

Tiu laboro kaj tiu misio estas ankoraŭ aktuala, same aktuala kiel ĝi estis en la tempo de Zamenhof.

Kaj ĝi estas io grava por la nuntempa mondo.

En multaj diversaj manieroj esperantistoj povas kontribui al tiu celo.

Mi ofte diras ke Esperanto estas unuavice eduka movado.

Ni celas eduki la mondon al nia maniero rigardi lingvojn, kaj al nia maniero trakti la komunikan rilaton inter la homoj, kio estas tiom kerna parto de homa identeco.

En tiu eduka laboro vi mem povas roli multmaniere ankaŭ enkanti vi mem (ĉu ne?) tralegante vi pri la situacio de popoloj en aliaj landoj, pri la historio de Esperanto, pri ĝia literaturo, pri la varmaj, informaj, instruaj kaj aliaj metodoj kiuj estas tre efikaj.

En la venontaj jaroj mi esperas ke nia asocio ludos pli kaj pli aktivan rolon en la trejnado de aktivuloj tra la mondo pri diversaj aspektoj de esperanta vivo, ke ni kreos multajn okazojn, multajn manierojn partopreni aktive kun aliaj homoj en aliaj landoj en diversaj kulturaj, sciencaj kaj aliaj projektoj kiuj estos tre kontentiga por vi persone kaj kontribuos al la longdaŭra konstruado de monda kulturo kiuj estas finfine unu al la celoj kaj la esencoj de la Esperanto-Movado. Do mi volus diri ke UEA estas asocio por vi por ni ĉiuj. Kune ni povus fari ĝin vere inda monumento kaj inda kunvenejo por homoj en la tuta mondo. Do mi fidas jen vian kunlaboron kaj vian subtenon en tiu laboro.

Dankon!



Mark Fettes (CRI-2013)





La 4-a PRINTEMPE en DAHLEM-BAASEM (30.3 - 6.4. 2013)

La Paska semajno organizita de EsperantoLand sub la gvido de Lu Wunsch-Rolshoven okazis fine de marto kaj komence de aprilo en *Dahlem-Baasem* meze de la *Eifel* regiono en Germanio. Partoprenis ĝin malgranda grupo de 12 geesperantistoj el Belgio, Francio kaj Germanio. Ni povis pli bone konatiĝi kaj ĝui agrablajn tagojn en la neĝkovrita pejzaĝo. La feria domo troviĝas en iom izolita loko duonĉirkaŭata per arbaro. Ĝi posedas ĉion por bona komforto de la uzantoj, eĉ naĝejon. Ĉiutagaj manĝoj estis abundaj kaj bongustaj. Por festi Paskon, ne mankis ĉokoladaj kaj koloraj ovoj kaj ankaŭ bongusta ŝafidforma kuko. De la manĝejo videblis la vilaĝo *Baasem*.

Ni aŭskultis prelegojn kaj ĝuis bildprezentadojn pri vojaĝoj prezentitaj de la partoprenantoj. Marcel Delforge rakontis pri sia vojaĝo per Transsiberia trajno survoje al Azia kongreso en Mongolio kaj pri interesa ŝipado kaj navigado tra la Danuba Delto en Rumanio. Oni spektis tri filmetojn, kiuj gajnis konkurson rilate al Esperanto. Tre interesa estis filmo pri Sumatro de Jean François Cousineau dum lia vojaĝo tra tiu ekzotika lando. Liba kaj Floreal Gabalda prezentis filmojn pri Venezuelo kaj ties folkloro vilaĝfesto.

Ni piedpromenis en la proksima ĉirkaŭaĵo, vizitis la urbeton *Kronenburg* kaj promenis laŭlonge de ĝia lago. En *Bad Münstereifel* ni admiris historian centron kaj plu-ekzistantajn fortikaĵojn. Ĝi apartenas al la plej bone konservitaj mezepokaj urboj en *Rheinlando*. Ravis nin la pitoreska urbo *Monchau*, situanta en rokeca valo de la okcidenta parto de la *Eifel* regiono en proksimeco de la belga limo. Marcel vespere rakontis pri aventuroj de Michel

Schmitz kaj la gastejo *Baraque Michel*, kiu rilatas al tiu regiono. En la urbeton *Nettersheim* ni vizitis naturcentron kaj ties ekspozicion pri la naturo kaj historio de la regiono kaj poste ni promenis en la ĉirkaŭaĵo. Revene ni haltis por admiri la kastelon *Schmidtheim*. En ĉiuj vizititaj urboj ni post la promonado kafumis kaj teumis dum agrabla babilado. Por viziti la urbon Kolonjon ni veturis trajne. La stacidomo troviĝas en apudeco de la mondfama katedralo. Promenante ni vizitis la urbodomon, *Mikwe* - la judajn ritualajn banojn, parfumejon, ĉokolad- kaj mustard-muzeojn.

Ĉiu-matene ni konversaciis kaj pridiskutis diversajn temojn: pri pasko-kutimoj kaj simboloj (ovoj, leporo, sonoriloj), pri diversaj E-aranĝoj en Germanio, Francio kaj aliloke. Oni povis konsulti fotoalbumojn kun raportoj pri diversaj Esperanto-eventoj, kiujn mi alportis. Aliaj temoj estis pri malfacilaĵoj kaj lingvoproblemoj. Ne mankis amuzaj ludoj kaj iom da dancado. Vizitis nin du esperantistoj loĝantaj en la regiono. Lu Wunsch-Rolshoven prelegis pri klimatgasa kompensado: (kompensado de produktitaj forcej-efikaj gasoj), ŝparo de energio, uzado de vojaĝrimedoj, varmigado, aĉetado-konsumado, alternativa energio (suno, vento...).

Ĉe la fino ni esprimis opiniojn pri la semajno. Resume ni povas diri, ke ĝi bone disvolviĝis kaj ni pasigis tre agrablan Pasko-tempon en la bela pejzaĝo de la *Eifel*-montaro, malgraŭ la malvarma vintra kaj neĝa vetero. Espereble venontjare la printempo venos ĝustatempe por povi ĝui vekiĝantan naturon kaj sunplenajn tagojn.

Liba Gabalda






PRINTEMPE-2013

Bad Münstereifel



Monschau




Kolonjo



Kastelo Schmidheim

Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

Eduardo Galeano «Voĉo de la Tempo»



La tutmonda merkato



Arboj kanelkoloraj, fruktoj oraj. Mahagonaj manoj pakas blankajn grajnojn en grandajn foliojn.

La grajnoj fermentas en la suno. Poste, elpakitaj, en la libera aero, la suno sekigas ilin kaj donas al ili iom post iom koloron kupran.

Tiam la kakao ekvojaĝas sur la blua maro.

Por pasi de la manoj kiuj kulturas ĝin al la buŝoj kiuj manĝas ĝin, la kakao traktiĝas en la fabrikoj de *Cadbury, Mars, Nestlé* aŭ *Hershey's*, poste estas vendata en la superbazaroj de la mondo : por ĉiu dolaro, kiu eniras la

kason, tri centonoj kaj duono venas ĝis la vilaĝoj de kie venas la kakao.

Richard Swift, toronta ĵurnalisto, vojaĝis al Ganao, en unu el tiuj vilaĝoj. Li vizitis la plantejojn.

Kiam li eksidis por ripozi, li elprenis briketojn de ĉokolado, kaj eĉ antaŭ ol povi mordi en iun, amaso da sciemaj infanoj premiĝis ĉirkaŭ li.

Ili estis neniam gustumintaj ion tian. Ili trovis tion tre bongusta.



Aŭskultu lastajn elsendojn de **Varsovia Vento**

Bondeziroj de multaj mojosaj homoj !

Intervjuo de Nikolin, Teĉjo, Martin, Flo', Heidi Goes, ...

... Muziko de Kapriol, Martin, Gijom, Platano, Dolĉamar, idc, Jomo, ...

Kaj multe pli !!!



varsovia vento
elsendoj

podkasto.net

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



Kroatio, Bosnio, kaj Hercegovino

(18/4 -> 29/4/2009 - 703 km => 3452 km)

▷ Rijeko, (rivero, en la kroata) estas nia unua halto en Kroatio. En Francio ni havas la aŭtan kuradon Paris-Dakar, Rijeko havas Paris-Bakar-n dum la karnavalo. Paris estas urba kvartalo kaj Bakar vilaĝo trapasata de la ĉaroj. Cikonioj migras al Kroatio. En iuj regionoj eblas trovi vilaĝojn dediĉitajn al cikonioj kie preskaŭ ĉiuj domoj portas neston. Ŝajnas ke ankaŭ la aŭtoj Renault 4L tien migris ; ni ĉiutage vidas dudek kelkajn de tiuj malnovaj sed neeluzebaj aŭtoj.

Ĉe la arbaroj antaŭ Zadar, ŝildoj "Atentu, minoj" rememorigas la tie okazintan militon en 1991-1992. Necesos, ke ni zorge priatentu, kie ni starigos nia tendon.



En Split, neniu esperantisto povas gastigi nin. Por solvi tiun problemon la loka Esperanto-grupo pagas al ni dormĉambron en pensiono kaj poste invitas nin al restoracio.



Post Split, ni trinkas pisaĵon (Pipi, en la franca), temas pri oranĝ- aŭ citrongusta trinkaĵo laŭ la nomo de knabino kun plektitaj haroj, iu rolulo por infanoj.

Je la marbordo, Kroation apartigas eta parto de Bosnio kaj Hercegovino. Kia kaprompilo por difini la marajn landlimojn, ĉar ĉiuj frontaj insuloj, je malpli ol unu kilometro for, estas kroataj kaj fermas ĉiun elirejon al bosnaj ŝipoj.

Ni imagis, ke ni vidos moskeojn apud kirkoj, kiel okazas en Sarajevo aŭ Mostar. Fakte, videblas nur kristanajn preĝejojn kaj grandega blanka kruco sur la plej alta monteto. Se ne estus la trapaso de landlimo kun doganejo, oni daŭre kredus sin en kroatio.

Plia landlimo por nur kelkaj malmultaj kilometroj kaj denova eniro en Kroation. Dubrovniko estas nia lasta grava etapo en tiu lando. Ĝi ja vizitindas, precipe vespere. Oni havas la impreson, ke estis ĉirita la pavimaro, ĉar la luno igas ĝin rebrili.

(daŭrigota)



Lidia Zamenhof kaj Bahaismo

Pluraj en la tuta baha mondo konataj kredantoj estis ankaŭ aktivaj esperantistoj kaj parte ankaŭ famis en la esperanta mondo. Inter ili certe elstaras Lidia Zamenhof, kiu kvazaŭ enkorpigis la kunfandighon de Bahaismo kaj Esperanto. (...)

«*La tuta homaro devas unuiĝi en unu familio*» - jen la moto, kiu priskribas la celon, kiun D-ro Ludoviko Zamenhof donis al sia vivo kaj por kiu li sinofere laboradis ĝis sia morto en 1917, kiam lia plej juna filino, Lidia, estis nur 13-jara. Tiutempe ŝi jam perfekte regis Esperanton kaj faris unuajn provojn traduki el la pola lingvo en Esperanton. Ŝi estis konvinkita, ke ŝi devos daŭrigi la laboron de la tro frue mortinta patro, nome la disvastigon de la Internacia Lingvo kaj la propagandadon de liaj pacigaj kaj monduigaj ideoj.



En 1925 Lidia Zamenhof finis siajn studojn kaj ekhavis la akademian gradon de magistro pri juro. Tio tamen ne kondukis aŭtomate al iu profesio, des pli ĉar Lidia estis judino, kaj por judoj ŝtata ofico estis praktike neatingebla. Ŝi ankaŭ ne interesiĝis pri dom-mastrado kaj neniam sentis emon al edziniĝo. Eĉ kuiru ŝi neniam lernis. Por ŝi estis klare, ke ŝi iel dediĉos sian vivon al la idealoj Zamenhofaj.

Esperantujo estis ŝia hejmo.

Dum la Ĝeneva Universala

Kongreso de 1925 okazis fakkunvenoj de la bahaaj esperantistoj, al kiuj Lidia estis invitita. Ŝi tute ne deziris tien iri, sed fine pro ĝentileco ŝi tamen partoprenis kaj konatiĝis kun Adelbert Mühlischlegel kaj Martha Root. La sekvantan jaron, 1926, oni finfine inaŭguris la Zamenhof-monumenton en Varsovio. ĉeestis Martha Root, kiu oficiale reprezentis la Bahaan Religion. Ŝi restis du semajnojn en Varsovio kaj dormis kun Lidia en sama ĉambro.

Ili fariĝis bonaj amikinoj, kvankam Lidia neniel volis akcepti la religiajn konvinkojn de Martha, des pli ĉar ŝi konsideris sin ateisto. Tamen, iom post iom Lidia konvinkiĝis pri la vereco de la Baha Kredo kaj fine akceptis ĝin.

En 1928, okaze de du bahaaj kunvenoj en la kadro de la Universala Kongreso de Antverpeno, Lidia faris unuafoje publikajn paroladojn, kaj tio sufiĉe mirigis la

esperantistojn, ĉar ĝis tiam ŝi neniam konsentis pri publika parolado kaj estis konsiderata kiel timema kaj retiriĝema persono. La cetera Zamenhofa familio neniel kontraŭis la konvertiĝon de Lidia al la Baha Kredo, sed ili ankaŭ ne komprenis ĝin. En 1929 Lidia eĉ publikigis artikolon pri la Baha Religio en pollingva juda gazeto, kaj tio ŝokis la familion kaj multe pli la judan komunumon.

Tiutempe Lidia komencis traduki "Bahá'u'lláh kaj la nova epoko" en



Esperanton, ĉe kio ankaŭ Martha Root kunhelpis.

En 1930 Lidia vojaĝis, t.e. pilgrimis, al Haifa en Palestino, sankta loko por bahaanoj, kaj renkontis Shoghi Effendi, la tiaman gvidanton de la Bahaa Kredo. Siatempe ŝi decidis lerni la Cseh-metodon por instrui Esperanton eksterlande. La Esperanto-movado tamen ne plu estis tiel favora al Lidia kiel antaŭe, ĉar parte oni malŝatis, ke membro de la Zamenhofa familio aktivis por la disvastigo de la Bahaa Afero, timante ke la publiko ekkredus, ke la Esperantismo estas intime ligita al iu religia kredo.



En Septembro 1939 eksplodis la Dua Mondmilito kaj Lidia havis la saman sorton kiel ĉiuj polaj judoj. Ŝi devis vivi en la varsovia geto, kie ŝi donis lecionojn pri angla lingvo por vivteni sin. La esperantistoj ne forgesis Lidian kaj sendadis pakaĵojn al ŝi. Germana soldato, kiu estis esperantisto, eĉ klopodis helpi al Lidia, ebligante al ŝi fuĝon, sed Lidia rifuzis.

En 1942 la nazioj komencis grandskalan ekstermadon de la judoj en Varsovio, kaj en Aprilo 1943 la varsovia geto estis definitive 'likvidita' de la nazioj. Oni supozas, ke tiam ankaŭ Lidia estis deportita al la koncentrejo Treblinka kaj mortigita tie kiel pli ol unu miliono da samsortanoj.

La mesaĝo de Lidia Zamenhof estis la unueco de la homaro, la interfratiĝo de la homoj, la emancipiĝo de la virinoj kaj batalo por paca mondo. Ĉio Ĉi radikis en la homaranismo proklamita de ŝia patro kaj en la instruoj de la Bahaa Kredo.

*Lidia Zamenhof, kor' fervora
Vartante patran sent-heredon,
Jen, serĉas sorĉan sav-
rimedon
Por mond' amara kaj dolora.*

*Kaj kun entuziasmo kora
Servadas la Bahaan kredon,
Lidia Zamenhof, kor' fervora,
Vartante patran sent-heredon.*

*El sent' profunda, pens' valora
En sino havas riĉan bedon.
El ili plektas flor-bukedon:
Novelojn kun enhav' trezora,
Lidia Zamenhof, kor' fervora.*

K. Kalocsay, 1931



Bahaia templo en Haifa (Israelo)

Literaturo: Isaj Dratwer Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado; Stafeto Antverpeno - La Laguna, 1980; kaj: Wendy Heller Lidia. The Life of Lidia Zamenhof; George Ronald, Oxford, 1985

fonto :
<http://bahaaeligo.bahai.de/H-tekstoj/home-H.html>



ĈU VI ANKORAŬ NE ALIĜIS ?

Kion damne vi atendas, fuŝulo ?

Aliĝu nun al nia **EBGa festo** !

ĉe Nikolao 0478 382 981 nikolao@esperantobruselo.org

enirprezo + aperitivo + manĝaĵo + distra programo : **15 €** (senpage por infanoj < 12jaraĝa)
... kaj la libro-servo de FEL ĉeestis !

Sabaton la 1an de Marto ekde la 11a ĝis la 18a horo
UPJB - Rue de la Victoire 61 Overwiningsstraat - 1060 Bruselo
Metrostacio «Hotel des Monnaies / Munthof »

